



Go-Amiko

**Informilo de
Japana Esperantista Go-Asocio
N-ro 150, Aŭgusto 2017**



Okazis Go-konkurso en Jacugatake-Esperanto-Domo



S-ro Mori rete ludas kun Matthias. Funde alia grupo ludas briĝon.

La 20an-21an de majo okazis Go-konkurso en la Domo. Tiu domo estas kursejo de Japana Esperanto-Instituto situanta piede de la mondo Jacugatake en la gubernio Jamanaŝi. Kolektiĝis 6 homoj: s-ro Sakurai Nobuo (8-dana, Tokio), s-ro Kinoŝita Hisaŝi (5-dana, Ŝizuoka), s-ro Mori Hitoŝi (5-dana, Ŝiga), s-ro Kaĵi Morisuke (5-dana, Kioto), s-ino Mori Amori (1-dana, Osako) kaj s-ro Hori Jasuo (4-dana, Gunma).

La rezulto estis:

1a premio: s-ro Mori kun 4 venkoj kaj 1 malvenko

2a premio: s-ro Sakurai kun 3 venkoj kaj 2 malvenkoj

3a premio: s-ro Kaĵi kun 3 venkoj kaj 2 malvenkoj.

S-ro Hori estis senvenka en la unua tago, sed en la dua tago li unue venkis s-ron Sakurai, la plej fortan inter la partoprenantoj, kaj sekve venkis s-ron Mori, kiu estis ĝis tiam sen malvenkoj.



**Unua vico: de maldekstre s-ro Sakurai, s-ro Mori, s-ro Kaĵi,
dua vico: s-ro Kinoŝita, s-ro Hori, s-ino Mori**

Alia menciinda afero estis, ke s-ro Matthias Reimann el Germanio partoprenis rete, kaj ludis kun 4 partoprenantoj. Li venkis en 3 partioj kaj malvenkis en unu partio kontraŭ s-ro Hori. Estas mirinda teknologio, ke momente aperas en la ekrano metoj post metoj.

En la lasta jaro ni ne povis okazigi la konkurson pro manko de partoprenantoj, sed en tiu ĉi jaro feliĉe ni havis sufiĉajn partoprenantojn. Membroj de JEGA ne estas multaj kaj ili dise loĝas en Japanio, do kolektiĝi estas malfacile. Por partopreni en tiu ĉi konkurso, ĉiuj krom s-ro Sakurai bezonis kelkajn horojn da trajnveturado kaj nemalmultan elspezon. Spite tiun malfacilon ili venis, plenaj de amo al Go-ludo.

Okazis Go-kunsido en la 65a Kansaja Kongreso




La 3an de junio 2017 dum la Kansaja Kongreso en la universitato Oosaka. S-ro Mori maldekstre ludas go-on kun Onia el Koreio kaj Siva Naga el Barato. Funde ludas 4 homoj, inter kiuj estas s-ro Ho Song el Koreio (plej maldekstre inter ili). La aliaj estas japanoj.


Komentoj pri la partio inter Reimann kaj Hori ĉe Jatugatake-Esperanto-Domo

Blanko: HORI Jasuo, Nigro: Matthias REIMANN kun 30 poentoj da *komi*-oj.

Diagramo 1a: Ĝis B-36 estas laŭorde. N37 glito estas malbona, pro kio la supra dekstra nigra ŝtonaro malfortiĝas. Ekde B-48 ĝis N-66 Nigro tre lerte procedis formante la blankajn ŝtonojn en bulon.




Diagramo 1a: Ŝtonmetoj 1a-70a.
B-64 sur spuro de N-19



Diagramo 2a: Ŝtonmetoj 71a-140a.
(montritaj kiel 1a-70a.)

Diagramo 2a : N-1 estas preferinde B-2 kio estas pli forta atako al la blanka maldekstra ŝtonaro. N-17 estu prefere salto ĉe punkton a, ankaŭ N-21 estu same ĉe punkton a. N-29 estas malbonega. Ĝi neniel utilas, male malutilas. La kupto B-40 estas tre agrabla por Blanko. N-51 estas grava ligo. B-52 estas akra atako pikanta malfortecon de la nigraj ŝtonaroj. La rezulto ĝis B-70 montras grandan profiton por Blanko.
(Daŭras al la sekva paĝo.)



Diagramo 3a: Ŝtonmetoj 141a-210a. (montritaj kiel 1a-70a.)

Preterlasitaj estas postaj ŝtonmetoj.

Diagramo 3a : Al la blanka atako respondo N-33, 35 estas bona procedo. Al B-44, B-46 Nigro ne respondante ŝprucas kiel N-47. Ankaŭ Blanko ne respondante al la ŝpruco tranĉas kiel B-48. Do ambaŭ iras sian vojon ignorante la alian - La rezulto montras pli grandan profiton al Blanko. Kaj tiel ĝis la fino de la diagramo 3a, Blanko superas ĉirkaŭ 30 poentojn totale (poentoj signifas la nombrojn de la punktoj en la teritorioj). La partio estis ludita ĝis la fina aranĝo kaj efektive Blanko havis 31 poentojn pli ol Nigro, sed fakte Nigro ricevis 30 poentojn kiel la handikapo, reala rezulto estas 1 poento favore al Blanko. Estis interesa partio konsidere la handikapon.

SAKURAI Nobuo

Go dum la UK en Koreio

1. Movada Foiro

La 22an de julio, sabate, okazis Movada Foiro, en kiu multaj Esperanto-organizoj prezentas sian agadon. Ankaŭ Go-Asocio prezentis go-ludon. Roman el Rusio ludas go-on kun vjetnamaj junulinoj.



2. Hazarda Go-kurso



Ĵaŭdon, la 27-an de julio, 60 homoj sidis en la salono Selten, atendantaj la neokazontan prelegon pri Koreio... Post kelkaj minutoj s-ro Hori Jasuo (KN 34), laŭ sugesto de s-ro Roman Efremov (KN 247), propones al la ĉeestantoj prezentadon de Go-ludo.

La komuna prelego de Hori Jasuo kaj Roman Efremov, inkluzive vivan ludon ĉe-tabule, kaptis la atenton de inter 30 kaj 40 homoj. Estas amuze, ke en la ĉambro nomita laŭ la Nobel-premiito pro ludo-teorio, ludeca prelego estis surprize anstataŭigita per prelego pri strategio-ludo Goo.



3. En koridoro

Roman gvidis la kurson en koridoro.

Vizito al Muzeo de la Malliberejo



Dum 35 jaroj ekde 1910 ĝis la japana kapitulaco en 1945 Japanio koloniis Koreion. Dum tiuj jaroj Japanio arestis kaj kruele torturis kontraŭjapanajn aktivulojn. Tiu ĉi malliberejo estis konstruita en 1908.



Estis malagrabable por mi alfronti krimojn de la japanoj, sed mi devis akcepti la faktojn.

En la najbara parko lokaj homoj ĝuis go-ludon kaj ŝakon.

日本植民地時代に独立運動家らを収監し、第二次大戦後は韓国政府が使った獄舎などを保存公開している西大門刑務所歴史館。植民地時代の監獄や死刑場、独立運動の取り調べの様子を史料や人形で再現しています。建物は、朝鮮半島で初めての近代的な監獄として日本政府が1908年に建築。終戦までに2階建て煉瓦造りの獄舎など10数棟や死刑場、死刑囚の獄舎群が造られ、日本植民地時代に朝鮮半島に設けられた刑務所の中で最大規模でした。

Ignorante kontraŭulajn metojn, gajnu teritorion

Maniero de la “Alfa-Go” ; tro frua invado sur tri-tri punkton.

: artikolo n-ro 25 “Lerte helpas vin bone spekti go-ludojn”


el ĵurnalo “Semajna Goo” datumita je la 24^a de Julio, 2017

Gvidanto: 林 漢潔 (japane; RIN KANKETU) 9a Danno profesiula

Ĵurnalisto A: Temas pri formaciado de unu el la tri partioj inter 柯 潔 (ĉine; KE Jie) 9a Danno profesiula kaj Alfa-Go, kiel ĉefa okazo de “Estra Konferenco por Estonteco de Goo”..... Kiel ŝajnis 柯 潔, kiu malvenkis ĉiujn tri partiojn?

Ĵurnalisto M: Iu aŭdis plorsingulton de 柯 潔 dum la 3a partio. Mi pensas, ke tiam li sentis perfektan superecon de Altefarita Intelekto (AI) super homoj.

漢潔: AI malkovris novan allogon kaj eblecon de go-ludo. La tabulo estas pli granda ol tiel, kiel ni sentis. Kaj eblas diversaj pensmanieroj. Danke al AI, ni ree rimarkis tion, kaj povas progresi plue.




Diagramo tema: el la 1a partio inter 柯 潔 (Nigro) kaj Alfa-Go en Estra Konferenco por Estonteco de Goo.

Mirinde estas tiel frue invadi sur tri-tri punkton. Ĉu ni amatoro povas trakti tiun ĉi strategion?

Ĵurnalisto M: En la diagramo tema, la fruan invadon, N-1, sur tri-tri punkton, kiun 柯 潔 ŝtonmetis, originale Alfa-Go lerte metadas.


漢潔: Ankaŭ mi estis surprizita, kiam mi unuavidis la ŝtonmeton de Alfa-Go, sed nun jam estis spertita. Ni ree studu la batalmodelon de la invado sur tri-tri punkton.

Ĵ-isto M: Kiel la batalmodelo, mi rememoras la procedon en la diagramo 1a.



Diagramo 1a: Tradicia batalmodelo


漢潔: Bonvolu tuj forgesi la tradician batalmodelon! Denovigita batalmodelo montriĝas en diagramo 2a.




Diagramo 2a: Nova batalmodelo

Ĵ-isto M: Ĉu ni ne devus meti la kutiman procedon de “Subbati kaj sinligi”, N-a, B-b, N-c kaj B-d?

漢潔: Ne! Grave estas fari alternativon de ŝtonmetoj sur punkton a kaj punkton e.



Diagramo 3a: Fari alternativon de ŝtonmetoj sur punktoj 2 kaj 3.



Diagramo 4a: Nigro tenas metrajton dum ŝtonmetoj N-2 kaj N-4.

Ĵ-isto M: Kiel Nigro devus respondi, kiam Blanko premas nigron per B-2, post Nigro aliloken ŝtonmetis ekzempere kiel N-1 en diagramo 3a?


漢潔: Ĉi tiam Nigro devus “Subbati kaj sinligi”.

Ĵ-isto A: Blanko malsaĝe hastis ŝtonmeton sur B-2, malurĝan, post la batalmodelo en diagramo 1.

Ĵ-isto M: Kion Nigro faru, se Blanko suben-iras, kiel B-1 en diagramo 4a?

漢潔: Nigro povas rampi kiel N-2 kaj 4, tenante metrajton, kaj trans-iri al N-6.

Ĵ-isto A: Kian rapidpaŝon!




Diagramo 5: 林 漢潔 9D pro- volus ĉi tiel ŝtonmeti.

漢潔: En tiu situacio, mi volus ŝtonmeti kiel N-1 en diagramo 5.


Ĵ-isto M: Ĉiu vi pensas, ke pli urĝe estas ŝtonmeti en malsupra rando ol tio en maldekstra rando?

漢潔: Jes. Sekve, se Blanko alproksimiĝas kiel B-2, Nigro etendiĝas kiel N-3, poste celas ataki blankan ŝtonaron ekde la gvato, ŝtonmeto N-a.

Ĵ-isto A: Ĉu vi diras, ke la blanka ŝtonaro dekstra ne havas fortan potencon? Kiel impertinenta!



Diagramo 6a: N-1 fariĝas efektiva, se Blanko respondas kiel B-2.



Diagramo 7a: Procedo de la reala partio

Ĵ-isto M: Kiel Nigro respondu, se Blanko alproksimiĝas de dekstre kiel B-2 en diagramo 6a?

漢潔: Nigro povas “Subbati kaj sinligi” kiel N-3 kaj N-5, tenante metrajton, kaj antaŭveni al maldekstra rando kiel N-7. Komparante tion kun diagramo 1a, la korespondo de ŝtonmetoj N-1 kaj B-2 estas avantaĝa efikado por Nigro. Krome, prefereble estas aliloken ŝtonmeti anstataŭ N-3 kaj N-5.

Ĵ-isto M: Kiel montrita en diagramo 7a, en la reala partio, Blanko respondis per ĉevala salto B-4 kaj procediĝis ĝis B-16.


漢潔: Kreita estas nova batalmodelo. Se mi ludus iun ajn el la ludanto tiam, mi preferus ludi Blankon. Sed generale la situacio ŝajnas egala.

Ĵ-isto M: Ke la frua invado sur tri-tri punkton en la diagramo tema estas lerta ŝtonmeto, mi estas konvinkita.

漢潔: Jes. Per la ŝtonmeto Nigro provas, de kiu flanko Blanko premas la nigran invadanton. La strategion mi rekomendas al ludantoj, kiuj amas teritorion kaj rapidpaŝan lud-manieron.

Ĵ-isto M: Grave estas ne ŝtonmeti “Subbati kaj sinligi”, N-9 kaj N-11 en diagramo 1... Mi ne povas sekvi la tempon. (plorante) (Fino)

Tradukita de MORI Hitosi



S-ro Hori eldonis du librojn.


La unua estas “Raportoj el Japanio 20”. (A5-formato, 238 paĝoj, Esperante, 15 eŭroj). Ekde la jaro 1998 li eldonadis seninterrompe tiun libron. Ekde la jaro 2011, kiam okazis granda tertremo, cunamo kaj nuklea akcidento, li ĉefe skribadas pri tiu temo.

La dua estas “Urboj de sumooisitoj tra la mondo” (A4-formato, koloraj 32 paĝoj, Esperante, 5 eŭroj). Hori iniciatis la legkonkurson « Esperanto-Sumoo » ekde la jaro 2009. En tiu sumoo partoprenas pli ol 350 homoj el pli ol 30 landoj. Hori havis intereson pri tio, en kiaj urboj ili loĝas, kaj li kolektis 30 eseojn pri la urboj. Tre bela libro, leginda en via klubo.

Ambaŭ libroj estas aĉeteblaj ĉe Libroservo de UEA, JEI kaj KLEG, aŭ vi rekte mendu ilin ĉe s-ro HORI:

horizonto@water.sannet.ne.jp

Kio estas JEGA?




Japana Esperantista Go-Asocio naskiĝis en la jaro 1979 kiel organizo de japanaj esperantistaj go-amantoj kaj subtenanto de Esperantista Go-Ligo Internacia, kiu celas disvastigi go-on per Esperanto kaj Esperanton per go-o.

Ek de la fondo de la asocio nia organo "Go-Amiko" estis eldonita jare kvarfoje, sed ekde 2015 trifoje, kaj ĝi daŭras ĝis nun kalkulante numeron pli ol 148-an.

Unu el la fondinto de la asocio, kaj dum la frua periodo la direktoro, Minosuke EMORI elverkis kaj eldonis gvidlibrojn de Go-o en Esperanto "Invito al Go-Ludo" kaj "Fundamento de Taktiko kaj Strategio en Go-Ludo" por disvastigi go-on tra la tutmonda esperantistaro.

La membronombro de la asocio kalkuliĝas ĉirkaŭ 40 konstante. La agado de la asocio estas okazigo de novjara go-kunveno kaj de go-kunloĝado en Esperanto-Domo de Jacugatake.

JEGA とは 日本エスペランチスト囲碁協会は 1997 年に発足。創立以来 Go-amiko を季刊で発行、現在 150 号になっている。会員は 40 人、新春囲碁大会と八ヶ岳エスペラント館での合宿を定例の行事にしている。出版物には Invito al Go-Ludo (囲碁への招待) と Fundamento de Taktiko kaj Strategio en Go-Ludo (囲碁の戦術・戦略の基本) がある。



Japana Esperantista Go-Asocio (JEGA) 日本エスペランチスト囲碁協会
Esperantista Go-Ligo Internacia (EGLI) 世界エスペランチスト囲碁協会
UEA-konto: egli-f

Retejo: <http://jega.shisyuu.com/jega/index.html>

Adreso: 2-13-3 Ootone, Maebaŝi, Gunma, Japanio, 371-0825, Japanio
Ĉe HORI Jasuo

371-0825 群馬県前橋市大利根町2-13-3 堀泰雄方

retadreso: horizonto@water.sannet.ne.jp 電話:027-253-2524